

PIV estas nia ĉefa laborilo

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 marto 3.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-09/SRI-1988-09-B-6-1988-marto-03-Claude-kaj-Andree-Gacond-PIV-estas-nia-ĉefa-laborilo.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Gvidante la esperanto-staĝojn, kiujn Kultura Centro Esperantista organizas en La Chaux-de-Fonds, mi konvinkiĝis, ke la plejmulto el la progresantaj gelernantoj stumblas pro la samaj lingvaj demandoj. La obstakloj, kiuj ĝenerale ŝancelas ilin en la praktiko de la zamenhofa idiomo estas la ĉi-sekvaj: ĉu verbo estas transitiva aŭ netransitiva, aŭ pli simple la ig-iĝ-verboj; la gent- kaj land-nomoj; la at- kaj it-participoj; la neceso aŭ neneceso de la sufiksoj il, ad, ec kaj ul; kaj fine la si-pronomo.

A.- Ĉu tiujn lingvajn problemojn naskas la gramatiko mem de esperanto, kiu estas eble tro komplika?

Cl.- Tre verŝajne ne. Mi havas la impreson, ke la ĝeneralan mallertecon antaŭ tiuj kelkaj punktoj kaŭzas lernolibraj mankoj: tro supraĵaj klarigoj aŭ didaktikaj simpligoj trompas la lernantojn, malhelpante ilin percepti la lingvan fenomenon en ties tuteco.

A.- Tio signifas, ke la lernolibroj estas nekontentigaj.

Cl.- Jes, vi pravas. Tial mi ĉiam konsilas al tiuj, kiuj aŭtodidakte lernas la lingvon, ke ili paralele trastudu almenaŭ du lernolibrojn, kaj ke ili atente tralegu verkojn de bonaj aŭtoroj, notante ne nur la novajn vortojn por ilin asimili, sed ankaŭ ĉiujn parolturnojn ne tuj kompreneblajn, ne timante konsulti la Plenan Ilustritan Vortaron.

A.- Vi priskribas labormetodon fakte propran al veraj lingvo-studentoj. Tute certe la menciita PIV ne troviĝas inter la studiloj de la esperanto-lernantoj. Tiu libro estas multekosta kaj ĝia konsultado ne estas tre facila.

Cl.- Multaj esperanto-lernantoj tre supraĵe organizas sian studadon. La hazardo akirigis al ili iun ajn lernolibron kaj ne ĉiam ili komplete tralegas ĝin. La kredo, ke esperanto estas multe pli simpla kaj facila, ol la naciaj lingvoj, igas ilin neglekti lern-disciplinon. Kaj la liberiga sento, ke tre rapide oni povas legi kaj paroli sen tro da malfacilaĵoj, kuraĝigas ilin fideli al tiu improvizita studmaniero.

A.- Ankaŭ ni agis tiel!

Cl.- Tute certe ! Unue iom hazarde ni renkontis esperanton, kaj mankis al ni instruista helpo. Kaj tio klarigas, kial ni daŭre faris la samajn erarojn. Relego de la organo "La Juna Voĉo", kiu estis nia esprimilo, konvinkis min, ke ni bezonis plurajn jarojn, antaŭ ol reale regi la lingvon internacian. Kaj fakte la ekmastron de la lingvo ebligis la aĉeto de la Plena Vortaro de Esperanto.

A.- Jes, tiam PIV ne ekzistis.

Cl.- Tiel longe, kiam ni uzis nur traduk-vortarojn, nia lingvo-uzo restis tre franceca, kaj strange, nia vorttrezoro tre limigita. Ekde kiam ni kontrolis pere de PV la ekzaktan signifon de la vort-elementoj trovitaj en la traduk-vortaroj, ni komencis lingve lertiĝi. La ekzemploj, trovitaj post la facile kompreneblaj difinoj, malkovrigis al ni dirmanierojn originalajn kaj novajn vortojn esplorindajn rilate al ties signifoj. Fajniĝis nia lingvo-percepto.

A.- La Plena Vortaro de Esperanto montriĝis fakte tre bona lernolibro.

Cl.- Jes, lernolibro, kiun mi konsilas al ĉiuj komencantoj. Mi diras al ili: "Neniam kontentiĝu nur serĉi esperantigon de vorto pere de nacilingva-esperantlingva vortaro. La trovitan esperanto-vorton vi tuj serĉu en la Plena Vortaro kaj post atenta trastudo de la klarigoj vi nepre tralegu la listigitajn ekzemplojn kaj la derivaĵojn, provante bone kompreni ties signifojn, sen necese trovi ekvivalentojn nacilingvajn, kiuj povas manki. Tiu esploro komprenigas, kiom esperanto estas preciza kaj aŭtonoma lingvo. Ĝi helpas emancipiĝi de la nacilingva influo.

A.- Kiam ni organizis semajnfinaĵajn renkontiĝojn aŭ skiferiojn ni baldaŭ malkovris, ke la nacilingvaj-esperantaj vortaroj estis tre limigitaj en siaj proponoj, kaj iom post iom ni rekte ĉerpis el la Plena Vortaro, kaj poste el la Plena Ilustrita Vortaro, la vortojn kaj esprimojn, kiujn ni bezonis.

Cl.- Ju pli ni sentis la bezonon precizigi nian vortuzon, des pli ni konsultis la Plenan Ilustritan Vortaron. Kaj tiuj konsultadoj ĉiam estis ege riĉigaj ne nur vortare, sed ankaŭ pensesprime kaj stile. PIV estas tre versaĵne ĝis nun la plej konvena lernolibro de esperanto. Tial eĉ okaze de esperanto-staĝo por komencantoj mi konsultigas tiun libregon al la studantoj. Mi sentigas al ili, ke ili troviĝas en privilegia situacio, kiun ĝenerale ne povas ĝui la neposedantoj de tiu fundamenta verko.

A.- Ĉu ili ne timas malfermi tiun libregon?

Cl.- Kelkfoje jes! Sed tre rapide ili intimiĝas kun ĝiaj sekretoj. Kaj ili spontanee serĉas en ĝi la ĝustan formon aŭ signifon. Kaj samtempe ili flankenmetas la kritikindajn lernolibrojn, pli kaj pli videble rimarkante iliajn mankojn aŭ supraĵecon.

A.- Por reveni al la obstakloj, kiuj ŝancelas la komencantojn, ĉu vi konstatis, ke la konsultado de PIV etigas ilin?

Cl.- Jes, tutcerte! La bezono paroli kun precizo evitigas al la lernantoj kutimiĝi al la propraj eraroj. Se okaze de dubo vorta aŭ esprima oni serĉas konsilon en PIV, oni komprenas, ke tiu librego estas la plej bona instruisto. Kaj tiam oni komprenas, ke ĝi ne estas tro kosta. Instruiston oni devas pagi. PIV ankaŭ indas je elspezo, kiun oni konsideru kiel investadon nepre necesan, se oni volas rapide regi la lingvon. Regado ne improviziĝas! La konkero de esperanto bezonas armilojn, kaj tre versaĵne la ĉefa estas PIV.

A.- Belan omaĝon vi esprimas al Gaston WARINGHIEN, la ĉef-redaktoro de PIV.

Cl.- Jes, ni neniam sufiĉe esprimos nian dankemon por lia vortarista aktiveco kaj ankaŭ al SAT, kiu eldonis tiun laborilon.

Kaj nun antaŭ ol konkludi nian elsendon, ni aŭdigas al vi la kanzonon „Mi ne timas“ de Jozefo Dinnyés, el la kasedo „Al venko“.

(muziko)

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia.

Cl.- La venontan semajnon Claude kaj Andrée GACOND daŭrigos sian raporton pri la instruado de esperanto parolante pri la participoj.

A.- Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*